



Nia E-Asocio en la inform-medioj

Aida Álvarez, subskribanta plejmultajn intervjuojn de la kolumno "En corto" ("persone proksime") de la ĵurnalo "El Comercio", invitis nian Asocion por unu tia intervjuo. Ĝi okazis fine de monato aprilo, en nia tiama sidejo; ĉeestis ĝin Eduardo, Celia kaj Marián (lernantoj en nia Baza Esperanto-kurso) kaj Faustino (instruisto), krom mi kaj Aida, mia edzino.

L' intervjuo estis neformala parolado inter Aida kaj ni dum proksimume duonhoru. La demandoj temis pri la historio de Esperanto kaj nia Asocio, pri la trajtoj de la lingvo (ĉefe ĝia lernofacilo), kaj tiel plu.

Oni publikigis l' intervjuon la trian de majo de 2007 kaj eblas ĝin legi en jena interreta adreso:

<http://www.elcomerciodigital.com/prensa/20070503/gijon/esperanto-facil-aprender-20070503.html>

Bedaŭrinde, ĉar la formato de "En corto" postulas unu-homan intervjuon, Aida redaktis kvazaŭ nur mi partoprenus. Tiel pensigas ankaŭ la duonvera publikigita foto ("duonvera" ĉar maldekstre de mi staris la ceteraj partoprenantoj).

Malmultajn semajnojn post tiu intervjuo de "El Comercio" (la dudekvaran de majo) min telefonis ĵurnal-

isto de TPA (Televido de l' Asturia Princlando) por raporti pri nia Asocio. Ĉi-foje, ni rendevuis en Oviedo, en l' Universitata Kampuso Llamaquique, kie ĉi-jare disvolviĝas la Esperanto-kurso en Oviedo.

Ĉeestis ĵurnalisto Consuelo Carrasco kaj kameraisto (kies nomon mi ne memoras, mi bedaŭras) kaj Aliflanke Dijna kaj David (lernantoj) kaj mi (instruisto).

Pro televide, ĉi tiu intervjuo postulis l' agordon de pluraj teĥnikaj aferoj: mikrofonoj, alĝustigi la lumon, filmado de materialojn en Esperanto (libroj, diskoj, revuoj)...

Consuelo demandis al ni pri Esperanto, nia Asocio,

k.t.p. Kurioze, ŝi scipovas la signolingvon por surduloj. Ni komparis la situacion de ĝi kun tiu de Esperanto, ĉar oni povas konsideri ilin ambaŭ "minoritataj lingvoj". Ŝi diris ke la signolingvo almenaŭ estas oficiale agnoskita por komuniki kun la ŝtata administracio.

La intervjuo daŭris proksimume kvindek minutojn (inkluzive de la teĥnikaj agordadoj) kaj kiam ĝi estos elsendata ĝi daŭros proksimume du minutojn, fine de la ĉiutaga programero "TPA novaĵoj".

Carlos E. Carleos Artime



Agado de nia Asocio

Ekde la publikigo de nia antaŭa **A.E.A.-informilo**, en kio koncernas al la agado de nia Astura Esperanto Asocio indas informi pri la jara Asembleo, kiu okazis la 30an de marto en nia tiama sidejo.

Post aprobi la akton de la antaŭa kunsido kaj la informon pri la agado de la Asocio, estis interkonsento pri la daŭrigado de la kutimaj taskoj de nia esperantista kolektivo: instruado pri la **Internacia Lingvo**, niaj publikigaĵoj ene kaj for de la (Inter)reto...

Cetere, estis neniu ŝanĝo en la kompono de la Asocia estraro.


En monato junio finiĝis la lernokurso 2006-2007. Kiel ni jam komunikis per la antaŭa numero de nia **A.E.A.-informilo**, post la

gvidado de la unua trimonato de tiu kurso fare de Santiago Mulas, ĉi tiu suferis gravan akcidenton kiu malpermesis al li daŭrigi tiun taskon dum multaj monatoj, kaj dediĉiĝi al longdaŭra kuracado, ankoraŭ ne tute finita. Tial oni devis enkonduki ŝanĝojn por la du ceteraj trimonatoj de la kurso: Ĉiusemajne, unu tagon gvidis la klason

Carlos E. Carleos, kaj la alian Faustino Castaño.

En la unua klaso de la semajno oni daŭrigis la lerno-planon tia kia ĝi estis antaŭe, sed en la dua estis iu novaĵo. Kiel ekzercio por praktikado de Esperanto-tradukado oni elektis hispanlinvan komikso-libron, tiu titolita **Alatristo**, inspirita en la verkaro de Arturo Pérez-Reverte. Kompreneble, ankoraŭ ne estas tradukita la tuta libreto. Kiam ĝi estos finita, ĝi povus esti kroma publikigaĵo en la esperantista mondo, iu alportajo de nia esperantista Asocio al la havaĵo de la esperantlingva literaturo, sed, malfeliĉe, tio ne eblos pro tiuj problemoj de intelekta propraĵo, kies solvo postulas specialajn, leĝajn permesojn de aŭtoroj, eldonistoj...

Alia flanko de la agado de nia Asocio estas la subtenado de la interreta blogo de A.E.A. Iompostiom oni aldonadas novajn materialojn: artikoloj, raportoj, tradukaĵoj, recenzoj kaj ĉiuspecaj esperantaĵoj dediĉitaj al la tutmonda publiko kun la propaganda celo montri la utilecon de la Internacia Lingvo.





La Granda Vortaro Hispana-Esperanta, de Fernando de Diego, publikigita en la jaro 2003, nun povas esti konsultata pere de Interreto. Ties enhavo, konstante aktualigata, estas trovebla en la ret-adreso:

<http://www.esperanto-es.net/diccionario/inicio.asp>

Nova sidejo de A.E.A.

Nia Astura Esperanto-Asocio estas enkadrigita en la Katedro “Jovellanos” pri Universitata Disvatigado. Tiu aparteneco al la Universitata strukturo utilis al ni, interalie, por la uzado de iu ejo kiu disponigis al ni tiu institucio. En monato junio de la nuna jaro, post la finiĝo de ĉiuj kursoj en la Domo de la Katedro, oni efektivigis la translokigon, planita antaŭlonge, de ĉiuj dependaĵoj, inter ili nia Esperanto-Grupo, de tiu centro al nova konstruaĵo, konkrete, la antikva “Lernejo pri Komerco”, poste nomata “Lernejo Jovellanos pri Entreprenaj Studoj”, en la numero 1 de la strato **Tomás y Valiente.**

En tiu nova loko oni disponigis al ni bone situitan ejon, multe pli ampleksa ol la antaŭa kaj tre taŭga por niaj laboroj de Esperanto-instruado, kunsidoj...

Kun tiu translokiĝo finiĝas por nia Grupo de Esperanto iu longa periodo de ĝia historio. En la antikva Domo ni “loĝis” ekde la fondiĝo de la Ateneo Jovellanos, en la jaro 1953. Tiam nia E-Grupo estis enkadrigita en tiu organizaĵo kaj rekomencis la funkciadon kiu interrompiĝis je la komenciĝo de la Civil-milito en la jaro 1936.

Tia organiza situacio daŭris ĝis la epoko de la demokratiigado, post la jaro 1977, kiam estis denove leĝpermesita la rehavo de la antikva titolo “Astura Esperanto-Asocio”, kaj de tiam ni estas enkadrigataj en la Universitata Katedro.

Esperante ke la nova ejo estu loko de granda kaj profita laboro favore al la Internacia Lingvo, ni profitas la okazon por danki al la Katedro “Jovellanos” pro tiu granda favoro al nia esperantista rondo.



66a Hispana Kongreso de Esperanto

La ĉi-jara Kongreso de Esperanto de nia lando okazis en Palos de la Frontera (Huelva) de la 5-a ĝis 8-a Julio kune kun la Kongreso de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo. El la programo indas mencii:

Ekspozicioj: libroj kaj aliaj objektoj.

Ceramikekspozicio. Francisca Alfonso kaj Chata Terrades

Prezentado de filmoj *Sevilla-ma-ravilla*, *Valencio en fajro*, *Chopin revenas al Majorko*, *Muroj kaj miljardeoj*, *Bona Espero*, filmitaj kaj komentitaj de Roman Dobrzyński (Aŭtoro de la libro "La Zamenhofstrato", kun interparoloj kun d-ro L.C. Zaleski-Zamenhof).

Seminarioj: "Transitiveco je la verboj en Esperanto". Djorge Obradoviĉ. (sloveno, inĝeniero). "Uzado de "si" kaj "sia" en Esperanto". Fran-cisko Simonet (el Parizo, Akademiano, estrarano de Libero por la Lingvoj). "Kunmetitaj verbo-formoj en Esperanto". Zlatko Tišljár. (kroato, nun loĝanta en Slovenio, Komitatano de UEA dum dudek jaroj).

"La uzado de prepozicioj". Augusto Casquero. (Prezidanto de HEF).

Prelegoj: "Liberon por la lingvoj" kaj "Unuaj momentoj de la historio de la Lingvo Internacia" (Francisko Simonet). La virinoj en la esperantistaro (Grazina Opulskine), el Litovio. "Esper-

anto, kiel identeca lingvo de EU, defendas malgrandajn lingvojn en la Unio" (Zlatko Tišljár). La serĉado de natura metodo por la instruado de Esperanto (Miguel G. Adúriz, kantabra verkisto kaj eldonisto en Esperanto). Linukso kaj Esperanto; kiel enmeti artikolon ĉe Vikipedio (José Carlos Cuevas). "La Esperanta muziko". (Eduardo Vargas, malaga muzikisto).

"La vivo en Ĉinio" (Augusto Casquero). "Malsamaj startpunktoj ĉe la nuna Esperanta mondo" (Fabián).

Amuzaĵoj: Loka artludado. Koncerto de Solo-tronik. Kultura vizito ĉe lokaj monumentoj. La Rábida kaj kolumbaj lokoj. Koncerto de Jomart kaj Nataša (kazajoj, loĝantaj en Stokholmo, Svedio) kaj loka Flamenka Grupo. Iluziista ludado.

Prezentado de libroj: traduko de "Platero kaj mi". Vortaro "AmikA" de Miguel Gutiérrez Adúriz.

Kunsidoj de HEF, AEU kaj JUSE.

Kursoj: Kurso por komencantoj (instruis laŭ la Cseh-metodo: Gražina Opulskieniĉ). Oni transdonis staĝdiplomojn al la gelnantoj kiuj sukcesis la staĝekzamenon.

Omaĝo al samideano Alfonso Escamilla Roa. Prezento de la omaĝo libro.



Ampleksa kolekto de Boletín, nun en Interreto

La HEF-portalo <http://www.esperanto.es> inaŭguris novan sektion longe atenditan: "BOLETIN".

Ĝi enhavas ampleksegan kolekton de "Boletín"-oj de Hispana Esperanto-Federacio ekde la numero 1, de la jaro 1949, ĝis la laste aperinta en la nuna jaro, numero 378. Mankas pluraj ekzempleroj, dezirinde kompletigitaj per pruntedono por skanado far esperantistoj posedantaj ilin. La malnovaj numeroj devenas el la kolekto de la Gazetoteko Lanti. La kolekto atingeblas per la ligilo "Boletín" en la adreso: <http://www.esperanto.es>